

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Inĝ. R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandojo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 28

ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

MARTO 1935

Ĉu Esperanto estas vivanta lingvo?

W. A. OESTE.

Unu el la plej gravaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto estas tiu, ke nia lingvo estas artefaritaĵo neorgana, tro konstruita, elpensita de unu cerbo, dum male vivanta lingvo evoluis en jarcentoj kaj jarmiloj per spirita laboro de sennombraj cerboj, de generacioj, popoloj, kulturepokoj. Tiun obstinan kaj unuavide tute realan opinion ni renkontas precipe ĉe kleruloj okupigantaj pri lingvoj. Kaj la fakto, ke multaj lingvistoj, kiuj vere interesiĝis iam pri nia lingvo, poste ĝin ne plu indigas serioze, montras al ni, kiel forte efikas tiu vola-nevola antaŭjuĝo. Certe ne sufiĉas, por venki ĝin, atentigi la skeptikulon pri originalaĵoj en Esperanto, eĉ ne igi lin aŭdi lertan parolanton; oni devas komenci ĝuste per la ĉefaĵo: lingvo ja ne estas io por si mem, lingvo sole estas ilo por interkomunikiĝi.

Kiel evoluis vivantaj lingvoj? La ekzemplon donas la unuopa homo mem: unue simplaj sonoj neordaj, krioj de ĝojo, malĝojo, sato, malsato. Iom post iom per influo de l' ĉirkaŭaĵo certaj sonoj ricevas certan signifon, kaj formiĝas vortoj, frazoj — lingvo. Ĉar ĉiu individuo impresiĝas alie ol la proksimumo, elparolo, vortoj, lingvo varias tiom pli, ol komunio de homoj vivas aparte. Tiel estiĝas lingvoj, ofte tute diferencaj reciproke; sed kiom ajn kontraŭaj ili estas laŭ la enhavo kaj pleje laŭ gramatika strukturo, ĉiuj lingvoj estas produkto de homoj, kiuj ĉiuj obeas al la samaj vivkondiĉoj. La kontrasto inter diversnaciaj kaj -rasaj homoj ŝajne ne estas tiom granda, kiom la lingvodiverseco.

Sed ĉar lingvoj estas homaĵo, ili propradire ne povas esti tiel diversaj. Do, se unu geniulo posedas la spiritan forton, proprigi al si ĝisfunde la ĉefajn lingvojn vivantajn kaj mortajn, t. e. antaŭe vivantajn, kaj sentas en si, komparante ilin, ion kio instigas lin konstati la komunan, kaj tion, kio en tiu aŭ tiu ĉi lingvo estas pli bona, praktika, logika ol en alia, kaj se tiu lingvisto ellaboras ne kaprice, arbitre, laŭeme, sed laŭlibone unu ŝajne novan lingvon, kiu unuigas en si kvalitojn ekskluzivajn de certaj lingvoj kaj kiu malhavas tiujn tute neorganajn kaj de ĉiuj kiel mankojn sentitajn neregulaĵojn de la vivantaj lingvoj, tiam tiu nova lingvo tute ne estas senviva, senanima artefaritaĵo, — ne, tiu lingvo estas ideala komprenilo. Nu, alegorianta ni komparu la spiritan ilon Lingvo kun materiaj iloj. Ĉu martelo, ĉar ĝi estas imitaĵo, artefaritaĵo, estas malpli taŭga ol la pugno? La malo estas vera. Nia gran-

dioza teknika ilaro, obeiganta la disfugemajn energiojn, ke ili utilu al la homaj bezonoj materiaj, plifaciligas, pligrabligas la vivon. Ĉu iu volus malhavi elektran lumon, ĉar ĝi ne estas „natura“, aŭ ĉu iu ne volus uzi motorveturilon pli rapidan ol la piedoj aŭ ĉevalo, ĉar ĝi estas artefarita? Sence, senracie, malprogresema! Ekzistas ja homoj, kiuj kontraŭas la maŝinaron nuntempan pro ĝiaj efikoj je la sorto de centmiloj da homoj. Tiuj homoj estas reakciuloj tute ne atentindaj, stultaj, eĉ se ili posedas honorojn kaj titolojn. Ili ne komprenas, ke ĉio en la kosmo estas fluo, evoluo, eterna fariĝado, — ili forgesas, ke la homo mem kun sia racio estas parto de la naturo, kaj ke tiu racio de si mem funkcias laŭ naturleĝo. Kiel la ondoj de l' maro pulsas en eterna ritmo, iam pli intense, iam pli malrapide, kun interrompoj ŝajne brus-kaj sed ankaŭ okazantaj en pli alta ritmo, tiel pasas la homara vivo. Fortoj konservemaj, nemoviĝemaj, neleviĝemaj kontraŭbatalas la fortojn emantajn al alteco, pliboneco, plifacileco, pliklareco. La unuaj fortoj nomas la duajn fiprogresuloj, kaj la duaj nomas la unuajn fireakciuloj. Inter ambaŭ okazas batalo kaj neniam estiĝas ekvilibro. La tutan evoluon de nia homa kulturo ni dankas al la progresemaj fortoj, — la mondesplorojn, la teknikon. Ĉiam unuopuloj, energiuloj de progreso kontraŭbatalis la tempspiriton kaj bedaŭrinde preskaŭ ĉiam viktimiĝis. Ĉiam la trokonservuloj ridindigis la „luziulojn“, kiuj tamen pli klare vidis en la estontecon: leĝo de batalo, de ritmo. La historio de la homaro estas al ni konscia kiel evoluo pli alten, pli bonen. Certe venos kulmina punkto, post kiam ĉio akirita ŝajne perdiĝos, kaj kiam alia homaro devos komenci alian, novan evoluon. Koscianta pri tiu eterna „rulado de l' ŝtono“, kiel diras Goethe, ĉu ni ne batalu por pliboneco, por io pli alta? Same oni povus diri, kial vi volas vivi, koscianta, ke vi devos morti? La respondo: naturaj fortoj!

La materia progreso de l' homaro estis pli facila, pli senbatala ol la spirita. Ĉar la materiaj bezonoj estas la unuaj, primitivaj, de kiuj dependas la vivo, kies daŭriĝon la homo, ankaŭ la reakcia, nepre emas.

La spirita evoluo antaŭenpaŝas pli malrapide, sed certe. Kion la tekniko signifas por la materiaj bezonoj, tion la lingvo universala por la spiritaĵoj. La ilo Tekniko pligrabligas la vivon materialan, la ilo Mond-

lingvo pliheligas la homan spiriton, plivastigas ĝian horizonton, plispiritigas la homaron. Kaj ke nia Esperanto estas tia ilo, tion pravas tre trafe la jena alegorio:

En antikvaj tempoj, longe antaŭ Homero, vivis juna paŝtisto, kiu paŝtis sian ŝafaron sur la herboriĉaj deklivoj de Parnaso. Iun tagon, li tranĉis kanon, boris en ĝi truetojn kaj eltiris el ĝi sonojn de rava dolĉeco. Ĝoje li invitis siajn amikojn, ke ili faru la samon. Sed ili mokis lin: Ĉu ne sufiĉas la kanto de l' birdoj kaj la melodia voĉo de l' junulinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon? Sed la paŝtisto persistis, kaj la junaj paŝtistoj el Parnaso iris por demandi la saĝulojn de Grekujo. „Ho, respektindaj saĝuloj“, ili diris, „ĉu ebla estas arta muziko?“ Kaj la respektindaj saĝuloj post longa medito, karesante sian blankan barbon, respondis fine per serioza voĉo: „Ne, paŝtistoj, tia muziko estas neebla, ĉar ĝi neniam ekzistis, kaj eĉ, se ĝi estus ebla, ĝi estus, kiel la lingvaĵo de l' barbaroj, nur sovaĝa miksaĵo, interfrakaso de sonoj, netolerebla por ĉiu delikata orelo . . .“

Triumfante revenis la paŝtistetoj al sia ŝafaro kaj ree mokis sian tro genian kamaradon. Sed obstina li restis. Senhalte li tranĉis kanojn kaj senĉese invitadis al ludo siajn kunulojn. Fine ili konsentis kaj ankaŭ siavice el la boritaj kanoj eligis sonojn de rava dolĉeco.

Tiel naskiĝis la arta muziko. Ĝi ne ĉesigis la kanton de l' birdoj, ĝi ne mutigis la melodian voĉon de l' junulinoj. Ĝi vivas, ho saĝuloj de Grekujo, kaj tiel longe ĝi vivos, kiel longe vivos homoj.

Simile ankaŭ nia Esperanto ne detruos niajn naciajn lingvojn, kaj tamen ĝi vivos por la bono de l' homaro.

Esperanto estas la eltrovaĵo de unu genia progresulo. Sed ĉio granda, revolucie nova naskiĝis en unu cerbo. Ĉiuj nunaj grandaj movadoj havis sian fondinton, sian kapon. Kial oni ne koncedu al Esperanto, kion oni koncedas al ĉio alia? Eĉ Esperanto, verdire, ne estas artefarita. Ĉar ĝi baziĝas tute je vivantaj lingvoj, ĝi estas kvazaŭ la natura, racia kvintesenco de l' eŭropaj kulturlingvoj. Ĝi estas la superlingvo enhavanta de ĉiu la plej bonan. Komparante Esperanton kun la plej disvastigitaj naciaj lingvoj, ĉu oni trovas, ke iu el ĉi tiuj superas ĝin? Ĉu iu el ili superus ĝin en la kvalito de universala helplingvo? Tute certe ne. Ĉiu nacia lingvo havas siajn specialajn preferaĵojn, sed ankaŭ — almenaŭ de la vidpunkto universallingveca, siajn tre grandajn malperfektaĵojn: aŭ la gramatiko estas tro komplika, aŭ la prononco tro mal-

facila, aŭ la flekseblo nesufiĉa, ktp. Restas Esperanto — esprimo de nia epoko de l' tekniko, raciigo. Iu diris en universala Esperanto-kongreso ke „Esperanto prezentas la vortriĉecon de la angla, la filozofiecon de la germana, la precizecon de la franca, kaj la belsonecon de la itala lingvoj. Vere, unuiĝas en Esperanto ĉio dezirebla pri tutmonda lingvo: logikeco, koncizeco, sentkvalitoj, beleco, facileco kaj senfina evoluebleco. Kial la mondo ne tuj akceptis entuziasme tiun plej majestatan faron de l' homa spirito en la novtempo? Kiel aĉa nebulo tiriĝas antaŭ la spirito la antaŭjuĝo komence de mi menciita: artefaritaj!

Do, ni iom ekzameni nian lingvon!

Ĉu iu vorto, posedanta propran signifon, en Esperanto perdis ion de ĝi ĉe elpreno el nacia lingvo? — Ne, ĉiu vorto konservas plene sian originalan kvaliton.

Ĉu la finaĵoj estas senpense elektitaj? — Tute ne! Ĉiu finaĵo korespondas al samaj aŭ minimume parencaj en naciaj lingvoj.

Ĉu eble la vortoj de l' korelativa tabelo, kiel: tiu, neniŭ, ĉiu ktp., estas arbitre prenitaj „el la aero“? — Neniŭ! Eĉ la vortoj kaj la finaĵoj de l' vortoj korelativaj estas elektitaj laŭ modeloj en naciaj lingvoj, kaj eĉ, se tiuj vortoj estus tute artefaritaj, la samon oni ne povus aserti pri la lingvo. Ĉar tiuj vortoj kaj ankaŭ la finaĵoj ja estas nur ligiloj kaj estas necesaj nur por estigi certajn rilatojn inter la signifaj vortoj.

Do, Esperanto, kvankam nova lingvo, modelita laŭ ekzemploj en naciaj lingvoj, ne estas lingvo „artefarita“ en la senco de io senviva, falsa; ĉar kion la ĉefaj naciaj lingvoj posedas je kvalitoj ekskluzivaj, tion Esperanto same posedas unuigita.

Kvazaŭ artefarite, neorgane efikas al ekstero la reguleco kaj certaj finaĵoj. Sed same kiel kabanloĝanto el Hinduja ĝangalo, unuafoje ekvidante la Novjorkajn gigantdomojn, glatajn kaj geometriajn, povas aŭ admiri tiajn grandiozajn verkojn de l' homa spirito, aŭ naŭziĝi, ĉar li pli amas la

konfuzan kreskajaron de sia hejmujo, ĉar ĝenas lin la akurateco, la ekzakteco de la formoj, — tiel same povas efiki diverse la reguleco de nia lingvo. Sed kiu sentas sin ĝenata de tiu reguleco, tiu montriĝas kiel trokonservemulo, neprogresemulo, reakciulo.

Rilate al senescepta apliko de certaj afiksoj la skeptikulo atentis, ke neniŭ sufikso estas sen modelo en nacia lingvo; due, vorto kun sufikso, ŝajne arta, post iomdaŭra uzado ricevas propran valoron, tiel ke oni ne plu sentas la kompozitecon de l' vorto. Same ja ankaŭ en naciaj lingvoj. La sufikso „in“ en certaj vortoj, kiel patrino, onklino, knabino unuavide efikas strange, precipe ĉe la vorto patrino. En la naciaj lingvoj tiu vorto estas kvazaŭ la plej peza vorto entute. Krome en ĉiuj hindogermanaj lingvoj konserviĝas la sama radikoj, nome la sono „m“, kaj ŝajnas, kvazaŭ ĉe tiu plej kara vorto de l' tuta lingvo montriĝus la prasono, kiun eligas infaneto ensuĉante la unuan lakton el la patrino mam. Certē, germane Mutter, angle mother, france mère, hispane kaj itale madre, ruse matj, latine mater, greke mētēr, hinde matar, unuiĝas en si tiom da kvalito, tiom da sento, tiom da sankteco, ke la Esperanta „patrino“, je komparo kun la vorto en la propra nacia lingvo, komence efikas malvarme, sentsente. Sed tiu impresio estas imago nepravigebla. La vorto „patrino“ nacilingve ja ne havas sian valoron pro la sonoj, sed pro la signifo. La signifo donas al la sonoj ilian postan valoron. Ĉar, se ĉino aŭ japano aŭ eskimo aŭdas en iu hindogermana lingvo la vorton „patrino“, sciante ĝian signifon, li certe ne sentas tiom, kiom en sia propra lingvo, kvankam en la lasta la sonoj estas tute malsamaj aŭ kontraŭaj. Ju pli la Esperanta „patrino“ estas uzata, des pli la sono de tiu vorto valoriĝas, kaj la vorto poste impresas nin same profunde kiel nia „Mutter, mother, mère, madre“ ktp.

(Daŭrigota.)

Mitologia esploro pri la Esperanta vortaro.

(Daŭrigo.)

De D-ro Prof. Penndorf.

La Gorgoj estis tri fratinoj, loĝantaj ĉe la ekstrema okcidento de la tero, en la regno de nokto kaj morto, flugilhavaj virgulinoj kun serpentaj haroj kaj zono, kun tiel teruraj vizaĝoj kaj okuloj, ke ĉiu, kiu ilin alrigardis, ŝtoniĝis. Tamen la juna heroo Perseŭs, helpata per miraklaj flugilsuoj kaj nevidebliganta kasko, sukcesis forbati la kapon de la dormanta Meduza kaj poste ĝin donacis al sia patronino Pallas Athene. Do la grekaj artistoj prefere ĝin kunigis kun la egido. Ĉar ĝi estas simbolo de la rigidiga teruro, ili ĝin reliefigis frutempe per malbelega grimaco, poste per bela, sed malvarma, sentsenta, rigida miemo. — Nuntempe strangaj markreskaĵoj estas nomataj meduzoj.

El la senkapa trunko de la Gorgo eksaltis la flugilhava ĉevalo Pegasos, suprenleviĝis al la dioj kaj nun restadas en la palaco de Zeŭso, al kiu ĝi alportas fulmojn kaj ton-dron. Poste oni opiniis ĝin ĉevalo de la Muzoj. Per hupotrapo ĝi kreis la fonton Hippokrene, entuziasmigan al kantado kaj

poezio. Sed simbolo de poeta fantazio kaj supreniĝo pegazo fariĝis nur laŭ moderna ideo.

Ankaŭ la fimero estas fabela monstro devena, laŭ Homero: „antaŭe leono, malantaŭe drako (serpenta vosto) kaj meze kapro, terure elspiranta ĉirkaŭe flamantan fajron.“ La Korinta heroo Belerofono ĝin mortigis, rajdante sur la flugilhava ĉevalo Pegazo. Krom bronza figuraĵo (en la muzeo Firenze'a) moneroj de Korinto vidigas la fabelan himeron; nun ĝi estas esprimo por fantaziaĵo, iluziaĵo, utopiaĵo.

Same monstra estis Hydra (hidro), naukapa drako, pli vere subakva serpentego, loĝanta en marĉo apud Argos (suda Grekujo). Herakleso kontraŭ ĝi batalis, sed — ho ve! — anstataŭ ĉiu forhakita kapo postkreskis du novaj; li sukcesis nur, post kiam lia kunulo estigis fajron en proksima arbaro kaj post ĉiu bato brule difektis la tranĉvundon. Do la hidro estas simbolo de la malbono (ekz. ribelo, revolucio, anarkio), kiu kvazaŭ des pli maltime progresas, ju

pli oni intencas ĝin subpremi, se oni ne ĝin nepre ekstermas. La nomo „hidro“ deriviĝas de la greka vorto por akvo, kiel la modernaj (sciencaj) terminoj: hidrargo, hidrogeno, hidrofobio, hidroterapio, hidrostatiko.

Harpioj, laŭ la vortsenco, estas demonoj rapide forprenantaj kaj forkondukantaj kiel ventegoj; laŭdire ili forrabis la homojn, kiuj malaperis neklarigeble. Oni imagis ilin flugilhavaj monstroj kun virina vizaĝo, birda korpo, akraj ungegoj kaj bekoj. Subite ili aperas, alflugante tra la aero, kaj kuregante forprenas sian rabajon. Estante avidaj, nesatigeblaj ili malpurigas la manĝaĵojn, kiujn ili ne kapablas engluti. Verŝajne laŭ origino ili estas animaj fantomoj kaŭzantaj malagrablaĵojn. Fame konata estas monumento en Xanthos (Malgrand-Azio) el la 6-a jarcento a. Kr. kun reliefoj de harpioj forportantaj homojn (nun en la Brita muzeo Londona).

Samspecaj estis la Sirenoj, fabelaj estaĵoj hibridaj, duone ĉarmaj knabinoj, duone birdoj. Per belega kantado ili allogis la ŝipistojn, sed poste elsuĉis ilian sangon; do ĉirkaŭ ili kuŝis amasoj da putrantaj haĵitoj kaj ostoj de mortintaj homoj. Por eviti ilian embuskon, Odiseŭs dum la veturo preter ilia insulo, ŝtopis per vakso la orelojn de siaj kamaradoj kaj igis sin mem ligi per dikaj ŝnuroj ĉe la masto de l' ŝipo, por ke li ja povu aŭdi la dolĉan kanton, sed ne risku la vivon. Fakte, ravita per la sonoj kaj vortoj, li deziris salti en la maron kaj transnaĝi al la bordo, sed laŭ antaŭa ordono la kunuloj ligis lin eĉ pli firme. Tiel li feliĉe preterveturis tiun fatalan insulon — ĉu eble la nunan „Capri“, miraklan lokon? Cetere la leganto verŝajne tuj memoras la legendon pri la Lurlej-rifo en la Rejn-rivero, ja gloran per poeziaĵo de H. Heine, ankaŭ Esperantigita de L. Zamenhof mem (Fund. Krestom. p. 327).

Tamen la sirenoj ne estas personiĝoj pri la alloga sed danĝera marakvo, sed vere sangavidaj animbirdoj. En grekaj tomboj ofte troviĝas malgrandaj birdoj homkapaj el argilo aŭ sur tombŝtonoj enskulptitaj aŭ surpentritaj — same kiel nuntempe sur tomboj precipe de mortintaj infanoj oni ofte vidas flugilhavajn anĝelojn.

Sed ankaŭ la vorto „sireno“ plu vivas por fizika aparato estiganta altajn akrajn sonojn. Tian fajfilegon uzas ŝipistoj, por eviti koliziojn dum nebula vetero. Elektraj sirenoj kunvokas la deputitojn de parlamento en la kunsidojn. Ĉu la mitajn mariksinojn aludas ankaŭ la esprimo „sireno“ uzata por strangaj marbestoj malbelaj?

Same flugilhava monstro kun kapo kaj brusto de virgulino, sed leonaj trunko kaj piedego estis la sfinkso. Ĝi kuŝis sur ŝtonego proksima al Thebaj (meza Grekujo) kaj proponis ridetante al ĉiu preteriranto la enigmon: „Kiu estas kreitaĵo voĉhava, kiu matene iradas sur kvar piedoj, tagmeze sur du, vespere sur tri?“ Kiu ne trovis la solvon, tiun ŝi senkompatte disŝiris kaj englutis. Fine Ojdiŭs solvis la enigmon per „la homo“ kaj devigis la monstron, ĵeti sin de la ŝtonego en la profundon. Ankoraŭ nun oni nomas personon, kies sintendado estas enigmo, „sfinkso“ kaj citas sfinksaĵon vizaĝon, rideton, okulojn. Krome sfinksoj estas nomataj ankaŭ la ŝtonaj figuraĵoj de leonoj homkapaj aŭ kuŝantaj virŝafoj, kiuj laŭvice aranĝitaj estigas aleojn al antikvaj temploj egiptaj.

Eĉ pli teruraj, timigaj demonoj estas la Erinioj aŭ latine Furioj, tri abomenindaj,

sovaĝaspektaj virgulinaj, havantaj serpentajn harojn, sangajn okulojn, grincigantaj la dentojn, surmetintaj longajn nigrajn vestojn kaj sangruĝajn zonojn, svingante torĉojn ardaĵen de la senkarnaj manoj. Ĉar ili reprezentas kolereman malbenon kaj persekutas senkompate murdintojn kaj friponojn, kaj ne kvietigas, antaŭ ol ili elsorbis la sangon de tiuj viktimoj. Nur poste ili estiĝas diinoj majestaj kaj bonfavoraj (Eŭmenidoj).

Ankaŭ nun superstiĉaj homoj, precipe dum mallumaj noktoj, sur senhomaj stratoj aŭ eĉ tombejoj, timas ĉiuspecajn aperaĵojn, fantomojn. Ĉi tiu greka vorto estas parenca al fantazio kaj fenomeno. Sed latine estas nomata la inkubo, kiu premege kusiĝas sur brusto de dormanto. Pli agrabla estas Morfeŭs, kreanta la multformajn sonĝaĵojn, kiu havigis sian nomon al dormigilo „morfino“.

Forta timigo karakterizas strangan dion, Pan, precipe adoritan en la montara pejzaĝo Arkadia (suda Grekujo). Li iom similis al bestformo, havante kornetojn, kaprajn piedojn, pintan barbon, hirtan hararon, voston. Vagante sur la montoj kaj en la valoj kaj arbaroj, li paŝtas kaj flegas la brutarojn, protektas la ĉasbestojn. Volonte li sonigas sian simplan fluton, li incitetas kaj persekutas la ĉarmajn nimfojn, estante voluptema. Ankaŭ solecajn migrantojn li timigas, subite aperante de malantaŭ arbtrunko aŭ enterurigas dum la tagmeza silento per laŭtaj sonoj. Tiamaniere li estiĝas la tiel nomatan „panikon“. Oni eĉ opiniis, ke lia terura voĉo venkas la timigitajn malamikojn, ekz. la Persojn en la batalo ĉe Marathon (490 a. Kr.).

Ankoraŭ nun „paniko“ estas ne klarigebla subita konfuziĝo, falsalarmono, senmotiva konsterniĝo; paniko aŭ senpripensa timigo ekzistas en ardanta teatro, sur fendiĝanta ŝipo; paniko aŭ tumulto ekkaptas borsancjn.

La ĵus cititaj nimfoj estas diinoj de malpli alta rango; la nomo ja signifas nur knabinojn edziniĝeblajn. Ĉie sur la tero, en arboj kaj kreskaĵoj, en fontoj kaj riveroj, sur montoj kaj en kavernoj ili ekzistas kaj reprezentas la viglan vivon kaj kreantan forton de la naturo. En grottoj ili ŝpinas kaj kantas, sur herbejoj ili saltas kaj dancas.

Tia nimfo estis Eho, kiu kapablas nek unua paroli nek silenti, se iu alia parolas. Pro amo al la bela ĉasisto Narciso ŝi malestimata konsumiĝis, ŝia ostaro rokiĝis, restis nur ŝia voĉo, la eho. Sed Narciso pro puno devis ami nur sian bildon. Triŝtante li ĝin rigardadis en fonto kaj konsumiĝis per nekontentigita sinamo. Lin fine anstataŭis la samnoma floro, simbolo de beleco sensenta, ne intima.

Simile naskiĝis la hiacinto. Estis iam bela knabo, kiun ekamis Apolo. Ofte la du kamaradoj kune ĉasadis, kune sin amuzis per ludo. Unua la dio ĵetis la pezan bronzan diskon alten ĝis la nuboj. Kiam ĝi ree falis teren, la knabo rapide alkuris, por ankaŭ konkure ĵeti. Jen, la disko resaltis kaj malfeliĉe trafis la vizaĝon de la knabo, ke li mortvundiĝis. Eĉ la dio ne povis reteni la elfluantan sangon, la malaperantan vivon.

Sed li kreskiĝis el la sango floran purpurruĝan kaj signis la folietojn per la ĝemsonoj AI AI (= ve, ve!). En ĉiu printempo ree ekprosperas la bela floro bonodora, memoriganta pri la knabo Hiacinto.

(Finota.)

W. E. Collinson:

La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de nordeŭropaj lingvoj.

(Fino.)

Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stockholm.

Por indiki la komenciĝon de ago, la germana uzas la prefikson *an-*, ekz. *anbeissen*, *anfahren* por iompostioma procedo kaj *lospor* forta, eksplodeca ago, ekz. *losschlagen*, *losfahren*; por indiki la finiĝon aŭ kompletecon ĝi uzas *aus-*, ekz. *auslesen*, kiel ankaŭ la nordlingvoj *ut-*, ekz. *utrøke sin pibe*, *el-fumi la pipon*, *utselge*, *elvendi*, *ha utterskt*, *utspunnet*, *esti eldraŝinta*, *elŝpininta*. La finna posedas tutan serion da verboj kun sufikso *-ahtaa* por subita aŭ momenta ago, kaj tiurilate prezentas trefan analogion al la Esperanta ingresiva prefikso *ek-*, ekz. *istua*, *sidi*, *istahtaa*, *eksidi*; *nukkua*, *dormi*, *nukahtaa*, *ekdormi*. La finna, krome, havas la ekvivalenton de la Esperanta sufikso *-ad*, ĉar ĝia sufikso *-ella* aŭ *-eskella* indikas ne nur longan daŭron, sed ankaŭ laŭokaze ripeton, ekz. *laulaa*, *kanti*, *laul-ella* aŭ *lauleskella*, *kantadi*; *olla*, *esti*, *oleskella*, *estadi*, *resti*.

Tre karakteriza por Esperanto estas la sufiksparo *-ig/-iĝ*. La kaŭza aŭ faktitiva sufikso *-ig*, kiu en Esperanto almetiĝas post verbajn aŭ adjektivajn radikojn, eble devenas el analizo de germanaj verboj kiaj *heiligen*, *reinigen* (antaŭ nelonge mi vidis por *raciigo* la belan germanismon *Ver-nünftigung!*) eble ne tute sen influo per la latina *-icare*, *-ificare*. La sufikso *-iĝ*, kiu

indikas la transiron el iu stato aŭ grado en alian, iomete memorigas pri francaj temoj en *-iss*: *verdir/verdissant*, *rougissant* ktp. Nur en la finna mi povas trovi taŭgan paron da sufiksoj respondaj al *-ig/iĝ*. Por *-ig* la kutima finna sufikso estas *-taa*, kiu almetiĝas al verboj, adjektivoj kaj substantivoj ĝuste kiel en Esperanto. Jen kelkaj ekzemploj: *puhua*, *paroli*, *puhutta*, *paroligi*; *helppo*, *facila*, *helpottaa*, *faciligi*; *raja*, *limo*, *rajoittaa*, *limigi*. Kontrastas kun la kaŭza sufikso *-taa* la *iĝ*-simila sufikso *-tua*, ekz. *laiha*, *maldika*, *laihtua*, *maldikiĝi*; *jakaa*, *dividi*, *jakautaa*, *dividiĝi*.

Ankaŭ en alia detalo Esperanto akordiĝas kun la finna. Kontraŭ la kutimo de la angla, franca, germana kaj sudeŭropaj lingvoj, kiuj uzas la helpverbon havi por esprimi la perfektan tempoformon de la transitiva verbo kaj kies transitivaj verboj havas nur unu particon preteritan, per si pasivan kaj ne aktivan, Esperanto ĉiam uzas la helpverbon esti kun la specifa aktiva participo, ekz. *mi estas leginta*. Zamenhof sendube ekkonis tiun trajton en la slavaj lingvoj, ekz. ĉeĥe *hodil jsem*, *mi estas ĵetinta* (ĉar la ĉeĥa havas nur unu helpverbon *býti*, *esti* kaj havas aktivan particon preteritan). Tamen, ankaŭ la finna formas sian perfektan tiamaniere kaj diras *hän on sanonut*, *li estas*

dirinta' kun la aktiva participo *sanonut*, *dirinta*, kontraste kun la pasiva *sanottu*, *dirita*. Ni ne forgesu, ke ankaŭ la sveda posedas du participojn, la reflekseblan aktivan *supinon* en *-t*, ekz. *skrivit*, *hört*, *stängt*, *fermint* kaj la flekseblan pasivan *participon* ofte en *-d*, ekz. *hörd*, *stängd*.

Post nia esplorado restas ankoraŭ grava demando, kiun mi kuraĝas starigi: ĉu Esperanto, severe restante en la kadro de la Fundamento, tamen povas lerni ion el la strukturaj fenomenoj de la nordaj lingvoj? Senhezite mi respondas per „jes“, kaj mi citos kelkajn punktojn, en kiuj Esperanto povus fariĝi pli fleksebla sen timo rompi iun ajn regulon.

1. En Esperanto ni formas multajn vortojn per kunmeto de radikoj kun prepozicio aŭ adverbo, ekz. *eniri*, *elfiri*, *foriri*. Nu, la angla; la germana kaj la skandinava lingvoj emas disigi la lokan rilatvorton for de la radikoj, ekz. angle *go in*, *go out*, *go away*; germ. *geh hinein*, *geh hinaus*, *geh weg*, norv. *trække ut en tann*, *sætte inn en tann*, ktp. En Esperanto ni povas elekti, sed nur en malmultaj kazoj, ekz. *mi supreniras / mi iras supren* aŭ *mi foriras / mi iras for*, kie *supren* kaj *for* estas adverbaj formoj kaj ne prepozicioj. Sed konsidere, ke ni allasas en Esperanto elipson post la adjektivo, ekz. *mi havas du plumingojn* kaj *donos al vi la ruĝan*, oni principe devus povi diri ne nur *li eniris* sed ankaŭ *li iris* en, simile *li venis trans*, la birdo *flugis super* ktp. kaj subkompreni la substantivon *ellasantan*.

Rilate al prepozicioj mi ŝatus ektuŝi alian problemon, tiun de la kunmetitaj prepozicioj. En la angla ni havas plurajn *into*, *on to*, *up to*, *from off*, *from under* ktp., sed ne *ut på*, *inn over* ktp. Nu, ĉiu, kiu instruas Esperanton al lernantoj, kies gepatra lingvo ne havas akuzativon, povas konstati la malfacilecon distingigi inter *en la domon* kaj *tiom*, *kiom* en la nordgermanaj lingvoj kun *en la domo*. Ni povos forigi la tutan malfacilaĵon, se ni konsentos allasi — krom la regula akuzativa konstruo — la uzon de *al* + alia prepozicio por indiki la direkton, ekz. *mi iras al en la domo*, *al sub la tablo*, *al sur la monto ĉiam*, kiam oni volas akcentigi tiun ideon de celo, sed en aliaj situacioj simple uzi la nominativon: *skribi sur la tabulo*, *en libro* ktp. Tre oportune ja estus havi la du kunrespondajn seriojn en Esperanto: *al sur / de sur*; *al sub / de sub* ktp. eble ankaŭ *trans sub*, *preter antaŭ*, *preter post* ktp.; tamen la plejmulto certe preferos diri *transiri sub*, *preteriri antaŭ* anstataŭ uzi la prepozician grupon.

2. En Esperanto ni kutimas uzi kun la infinitivo nur tre malmultajn prepoziciojn, ekz. *por*, *anstataŭ* kaj *pro* la malinklino de D-ro Zamenhof — tre malofte sen. Tamen ŝajnas al mi granda utilo, se ni povus kutimiĝi al la pli granda libereco de la nordgermanaj lingvoj tiurilate. En la norvega lingvo oni povas uzi antaŭ infinitivo *gjennem*, *per*, ekz. *gjennem å læse*, *per legi*; *uten*, *sen*, ekz. *uten å tenke*, *sen pensi* kaj multaj aliaj. En la franca oni ofte malpezigas frazon per uzo de infinitivo *kun pour* (ankaŭ en kaŭzrilato), *à moins de* (anstataŭ tuta subfrazo kun *à moins que*) ktp. La angla havas tre oportunan *ing*-formon de la verbo, kiun ĝi uzas post multaj prepozicioj, ekz. *by*, *because of*, *before*, *after*, *about* *reading*. Kial oni ne diru en Esperanto: *mi ne povas nun elfiri pro devi skribi kelkajn liniojn*? Ĉiuokaze Esperanto povas fieri, ke ĝi tiom

facile povas formi substantivojn de la verba agado.

Je tiu rilato ĝi havas la liberecon de la angla kaj la nordaj lingvoj kontraste kun la germana, kies uzo de la sufikso **-ung** estas pli limigita. Mi vidis kun intereso en mia hotelĉambro faskon da paperoj kun la subskribo en la sveda för torkning efter rakning, do precize kiel en la angla for drying after shaving kaj kiel en Esperanto por sekig(ad)o post razado.

3. Tre oportuna ŝajnas al mi la skandinava uzo de **-s**, sufikso por formi pasivan, refleksivan aŭ reciprokan verbon, ekz. **skri-ves, treffes**. En Esperanto **-igas** povas laŭokaze plenumi almenaŭ la du unuajn rolojn menciitajn. Ni ne povas nei, ke ekzistas en Esperanto iom da malfacileco por multaj studentoj je la uzo de la pasivaj participoj. Kun la prezenco estas oni facile komprenas kaj uzas la participon, ekz. la domo estas konstruata, la domo estas konstruita, sed oni ofte hezitas, antaŭ ol elekti post estis la formen en **-ata** aŭ tiun en **-ita**. Li estis arestata sugestis iomete la daŭron de la restado; li estis arestita kontraŭe la pluskvamperfekton aŭ antaŭpreteriton. Oni ja povas diri li estas arestita, sed la prezencia formo estas atentigas pri rezulto ankoraŭ ekzistanta kaj ne al la simpla ago en la pasinta tempo. Eble la plej logika rimedo estus li igis arestita, kp. er wurde verhaftet, han blev aresterat, he got arrested. Ĉar oni jam ofte uzas en Esperanto troviĝi kaj naskiĝi, mi demandas al mi, ĉu oni ne povus fari pli ĝeneralan uzon de tiu sufikso. Troviĝi ja analogas al okazi, ekzisti, kaj naskiĝi al ekvivi, vivantiĝi, do la ig-formo ne tiom ŝokas kiom en frazo kia li arest-igis! Ŝajnas al mi, ke **-ig** konvenas bone, se oni ne unuoloke celas la aganton, sed la venon en ekziston de nova stato. Ekz. la domo konstruiĝis en ses monatoj, kp. angle the house went up in six months; la ŝtono jetiĝis el distanco de 100 metroj, kp. the stone was flung (hurtled through the air) from a distance of 100 metres. Eble oni povus ankaŭ uzi kiel en la finna neper-sonan pasivon, ekz. dirigās (ke), konsider-igās (ke), kiel la finna sanotaan.

4. Ne tute malsimila estas la problemo de la gramatika konstruo uzebila aŭ uzenda post verboj de aserto, scio kaj sento. Jen ni renkontas nian malnovan amikon: la latinan akuzativon kun infinitivo! Ni povas distingi du tipojn de subfrazoj anstataŭ-endaĵ: a) kun sama subjekto kia en la ĉef-frazo, b) kun malsama subjekto. Mi devas konfesi, ke mi ne scias, ĝis kioma grado oni rajtas en Esperanto diri: mi kredas povi helpi vin, li pretendas posedi la latinan lingvon (kiel oni povas diri france: je crois pouvoir vous aider, ktp.). Ĉu oni ne povus etendi tian uzadon kaj diri: li asertas esti la heredanto aŭ eĉ li diras esti la heredanto? Ĉiuj ĉi frazoj havas subkomprenatan sed ne esprimitan akuzativon min, lin ktp. Se temas pri du nesamaj subjektoj, Esperanto ja ofte uzas la akuzativon kun infinitivo post vidi, aŭdi, ekz. mi vidis lin ludi, mi aŭdis lin kanti. S-ro Grenkamp-Kornfeld citas en sia Kompletta Gramatiko (Jaslo 1930): mi kredas lin esti bona. Denove ni staras antaŭ enigmo. Ĉu oni rajtas ankaŭ diri: mi asertas lin esti bona, mi diras lin veni, mi deklaras lin esti kulpa (oni efektive ofte aŭdas mi deklaras lin kulpa)? Aliflanke la sama gramatikisto rejetas la konstruon, se ĝi enhavas post si alian akuzativon, ekz. mi kredas lin ami sian edzinon (cetere mi ne komprenas, kial tiu frazo povas esti mis-

komprenata, ĉar sia rilatas al lin). La angla iras pluen kaj uzas infinitivon kun akuzativo eĉ post la verboj pruvi, ekz. that proves him to be a criminal, atendi, ekz. I expect him to come soon kaj deziri aŭ bezoni, ekz. I wish him to come at once, I want him to be here, I need him to be about, sed ne post esperi „to hope“. En la nordgermanaj lingvoj tia konstruo troviĝas post se „vidi“, høre „aŭdi“, befale „ordoni“, anse „rigardi“, tillate „permesi“, sed ne post verboj de deziro, pruvo, penso, krom kun refleksiva pronomo: sv. jag tyckte mig höra „mi kredis min aŭdi“, han påstod sig veta „li asertis sin kredi“. La finna tre ofte anstataŭigas subfrazon post verbo de kredo aŭ aserto per genitivo + participo prezenca aŭ preterita, ekz. luulen että hän tulee / luulen hänen tulevan = mi kredas lin esti venanta aŭ esti venonta, luulen hänen tulleen = mi kredas lin esti veninta. Nu, mi diris sufiĉe nor montri al vi, ke ekzistas ĉi tie problemo, kiun ni ne povas solvi dogme kaj arbitre, sed kiu meritas paciencon konsideradon. Eble akceptinda solvo estus la uzo de la simpla participo sen „esti“, ekz. mi kredas lin veninta, venanta, venonta.

Ŝajnas al mi, ke mi nun jam kunportis sufiĉe da materialo por pruvi mian tezon, ke la nordeŭropaj lingvoj montras multajn rimarkindajn paralelojn al Esperanto. Se vi konsentas, ke mi estas prava, vi sendube konsentos ankaŭ, ke tio estas tre grava fakto rilate al nia sinteno al kritikemuloj. Mi estas ĉiam opiniinta, ke oni ne rajtas juĝi Esperanton sole laŭ la vidpunkto de la okcidenteŭropaj nacioj, kiuj havas eble pli grandan parton en la klasika tradicio. La Internacia Lingvo nepre devas taŭgi por la malgrandaj nacioj kaj por tiuj, kies lingvo-strukturo tre malsimilas al tiuj de la okcidentaj kulturlingvoj. En la profundoj de sia spirito Zamenhof ekvidis la bonan vojon por plenumi tiajn bezonojn: unuflanke per sia grandskala apliko de la logiko al la problemoj de gramatiko kaj aliflanke per sia fido al la valoro de kelkaj konstruoj troveblaj precipe en la germanaj kaj la slavaj lingvoj. Ensbormo kaj rapida adaptiĝo al la situacioj de la ĉirkaŭmondo estas la signoj de vivanta organismo, kaj ambaŭ kvalitoj klare montriĝas en Esperanto. Esperanto ne estas produkto de komitatoj aŭ komisionoj, kunflukita aŭ kunĉarpentita el la kompromisoj de disputantoj; ĝi estas sintezo plenumita en la menso de genia individuo, do ĝi estas vera organismo, en kiu ĉiu membro nepre devas kunlabori kun ĉiu alia, glate, konsekvence kaj harmonie.

LINGVA TRIBUNO

Vetero rosa kaj pluva.

Vetero samtempe rosa kaj pluva ne okazas. Kiel fakulo pri veterobservado mi do ekmiris, kiam mi legis en fabelo de Andersen (III, p. 66), ke en la valo regis vetero rosa kaj pluva. Ne longe mi miris: lerninte en nia dulingva lando rapide sencigi la ĉiutagajn gazetajn sensencaĵojn, mi tuj „reentradukis“: roso = Tau, vetero = Wetter, rosa vetero = Tauwetter, Tauwetter = deĝelado. Ĉi tiu — kiel ni ĉiuj ja spertis — nur tro bone akordiĝas kun pluvo, eĉ pluvado kaj pluvego.

La „Majstranoj“ eble mallaŭdos min, ĉar mi substrekis eraron de D-ro Zamenhof; li mem dankus la atentigon des pli, ĉar la Fabeloj de Andersen estas rekomendataj al

la lernantoj. Eble sekvonta eldono anstataŭigos la vorton „rosa“ per „deĝela“.

Cetera negermana kleruilo, eĉ bonege konanta la germanan lingvon, facile faros tiun nepre pardoneblan eraron, kiun eĉ la plej malklera germana ĵernulo ne farus.

Do estas prava la postulo, ke oni traduku el sia gepatra lingvo. Kaj ankaŭ la duan postulon, ke oni traduku la originalon, pravigas la sama fabelo „Sub la saliko“.

Gravan rolon ludas en la rakonto de kreskaĵoj, saliko kaj dua, nomata jen sambuko, jen siringo. Franca leganto (ekzemple) ne komprenos, kial temas kvarfoje pri sambuko, poste dufoje pri siringo, refoje pri sambuko, kaj fine trifoje pri siringo, kvankam la poeto ĉiam pensis pri la sama arbeto.

Germana leganto eble tute ne atentos tiun konfuzon, ĉar germanlingve oni kutimas intermiksi Hollunder kaj Flieder; la bonega vortaro de Christaller atentis tion, klarigante: Hollunder = sambuko, sed Flieder (Hollunder) = sambuko, Flieder (spanischer) = siringo. (Cetere, kiel botanikisto, mi tre ŝatas tiun malordon, pravigante per ĝi la uzon de latinaj nomoj.)

Ankaŭ tiun ĝenaĵon, sendube kaŭzitan de germana tradukinto, sekvonta eldono devus malestigi, nomante la kreskaĵon aŭ ĉiam sambuko, aŭ ĉiam siringo.

Ĉu mi aligu korekton por la germana traduko? La saliko estas nomata paĉjo, la sambuko panjo; germanlingve, laŭ la gramatika sekso, estus pli konvena saliko-panjo kaj sambuko-paĉjo. Eĵuna.

Poste. — Ajn.

En Lingva Kritiko n-ro 26 (oktobro 1934) riproĉas iu leganto la strangan uzon de „poste“ en la romano „Mi en li“. Tiu uzo estas naciismo. Mi uzas ĝin simile, kiel ekz. ankaŭ en la germana oni diras: „Dann ist es nicht ihr Blut“; en tia frazo oni devas kompletigi: „Poste oni devas konkludi, ke la sango ne estas la ŝia“. Anstataŭ „poste“ estus preferinde diri „tiuokaze“.

En la sama numero riproĉas iu svedo la uzon de „ajn“ en la senco de la germana maniero kaj supozas, ke D-ro Zamenhof protestus kontraŭ ĉi tiu uzo. Mi havas la saman opinion, kaj Grosjean-Maupin flankeniĝis en la Plena Vortaro de la Fundamento asertante, ke „ajn“ almetiĝas al sendifinaj vortoj, ĉar Zamenhof diras en § 30 de la Fundamenta Ekzercaro: „Aldonante al la vortoj demandaĵ la vorton „ajn“, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kion ajn, kiom ajn, kiu ajn.“ Pri ĉi tiu erara uzado de „ajn“ laŭ la germana maniero estis artikolo en „Esperanto-Praktiko“, resp. en „Germana Esperantisto“ sur paĝo 151 de la jarkolekto 1932 (n-ro 8/9). La ekzemploj, kiujn Grosjean-Maupin donas en la Plena Vortaro ĉe „ajn“, tekstus laŭ Zamenhof jene: La eniro estas libera por kiu ajn; donu al mi ion por trinki (germ.: gib mir irgend etwas zu trinken) aŭ: donu al mi kion ajn por trinki (germ.: gib mir was auch immer zu trinken); la esperantaj ŝlosiloj donas la eblon al homo de ia ajn (ĝuste: de kia ajn) nacio tuj kompreni la skribaĵojn; neniu esprimu, kiun la gazetaro ne akceptas, havas ian ajn (ĝuste: kian ajn) ŝancon triumfi; ĉiu ne estas kapabla fari ĉion ajn (ĝuste: kion ajn).

La esprimo „ĉio“ certe ne fariĝas pli ampleksa per aldono de „ajn“, la aldono de „ajn“ kontraŭas do ankaŭ la regulon de sufic. J. Rebiček.